WIKIPEDIA

Luksemburga lingvo

La **luksemburga** (aŭ **leceburga**) lingvo estas ĝermana lingvo parolata en Luksemburgo kaj en Belgio (en la regiono Sankt-Vith kaj Arlon). Ankaŭ en malgranda parto de Germanio kaj Francio (ĉirkaŭ Thionville) oni la lingvon parolas.

La luksemburga lingvo estas ĝermana lingvo kiu de la popolo de Luksemburgo estas uzata por ĉiutaga komunikado. Ĉar la lingvo estas ne tiom forta, preskaŭ ĉiu luksemburgano ankaŭ parolas la germanan aŭ la francan lingvon. Ne ekzistas ĝis nun alta edukado en la luksemburga lingvo.

Pro malagrablaj rememoroj de la germana okupado dum la Dua mondmilito, multaj luksemburganoj ne ŝatas kiam eksterlandanoj nomas ilian lingvon "dialekto de la germana". Kvankam la lingvo sufiĉe similas al la germana, estas tamen sufiĉe da diferencoj por nomi la luksemburgan aparta lingvo.

Luksemburga lingvo	
Lëtzebuergesch	
Parolata en	Luksemburgo
Parolantoj	391 200
Denaskaj parolantoj	proksimume 300.000
Fremdlingvo / dua lingvo por	?
Skribo	latina
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Luksemburgo
Reguligita de	neniu oficiala organizaĵo
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	lb
ISO 639-2	ltz
ISO 639-3	ltz
SIL	LTZ
Glottolog	luxe1241
Angla nomo	Luxembourgish
Franca nomo	luxembourgeois
Vikipedio	

Kelkaj frazoj

- Jo. *Jes.*
- Neen. *Ne.*
- Villäicht. *Eble.*
- Moien. *Saluton.*
- Äddi. *Ĝis.*
- Merci. *Dankon.*
- Firwat? *Kial?*
- Ech weess net. *Mi ne scias.*
- Watgelift? aŭ Entschëllegt? *Mi pardonpetas?*
- Fräi. *Libera.*
- Heem. *Hejme.*
- Ech. *Mi.*
- A. *Kaj.*
- Mäin. *Mia.*
- Kand. *Infano*
- Wee. *Vojo*

Eksteraj ligiloj

- Enkonduko al la luksemburga ortografio (el Retarkivo 2007) (https://web.archive.org/web/2007/http://www.cpll.lu/cpll/schanen_lulling_letz.pdf) (pdf)

- Vortaro luksemburga - angla (http://www.websters-online-dictionary.org/definition/Lŭembourgish-english)
- Ortografio (el Retarkivo 2006) (https://web.archive.org/web/2006/http://www.men.lu/edu/fre/publications/CEN/letzebuergesch.pdf)
- Ortografio (el Retarkivo 2006) (https://web.archive.org/web/2006/http://www.etat.lu/memorial/memorial/a/1999/a1121108.pdf)

Nomŝildo dulingva en Luksemburgo

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Luksemburga_lingvo&oldid=6773738"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 18:08, 31 okt. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.